


MESTO NITRA

# NITRA


malkovru
la urbon,
spertu
la historion




# SITUO


La urbo Nitra troviĝas en la sudokcidenta parto de Slovakio, proksimume 90 kilometrojn de la ĉefurbo Bratislava. Ĝi estas tre facile atingebla per trafiko.




Nombro de loĝantoj: 80 524
(la 1-an de januaro 2015)
Areo de la urbo: 108 km$^2$

Supermara alteco: 167 m s. m.
GPS: 48˚ 18´ 25´´ N, 18˚ 5´ 11´´ Or



# HISTORIO

Nitra estas unu el la plej malnovaj urboj en Slovakio, kiu ekestis sur sep montetoj. Eblas diri pri ĝi, ke ĝi estas paradizo por arkeologoj. La teritorio de Nitra estas seninterrompe priloĝata ekde preskaŭ tridek mil jaroj.

En Nitra rezidis princo Pribina, kiu konstruigis kaj sanktigis en la urbo la unuan kristanan preĝejon en Slovakio (ĉirkaŭ la jaro 828). En 863 alvenis al nia teritorio la tesalonikaj fratoj Konstanteno kaj Metodo por disvastigi la kristanan kredon ĉe niaj praulój en ties propra lingvo. Al Konstanteno ni dankas ankaŭ por la unua slava skribsistemo: glagolico. Dum la epoko de la Granda Moravio Nitra estis unu el la plej grandaj priloĝataj aglomeraĵoj en centra Eŭropo.

La unua skriba mencio pri Nitra devenas de la jaroj 871-873 el la verko „Pri konverto de bavaroj kaj karintianoj“. Nitra estas menciita ankaŭ en la aktoj Zoborské listiny el la jaroj 1111 kaj 1113 (konservitaj en la muzeo Diecézne múzeum). Komence de la 12-a jarcento estis fondita ĉe la piedo de la monto Zobor la plej malnova monaĥejo kaj lernejo en Slovakio: la benedikta monaĥejo de sankta Hipolito. En 1248, kiel dankon pro defendo en batalo kontraŭ tataroj, la regnestro Belo la 4-a donis urbajn privilegiojn al Nitra. Ĝi restis grava ekonomia centro eĉ dum la epoko de Aŭstrio-Hungario.



# NATURO

Nitra situas ĉe ambaŭ bordoj de la rivero Nitra, sub la majesta monto Zobor (587 m s. m.). Ĝi troviĝas ĉe la limo inter la ebenaĵo Podunajská nížina kaj la montaro Tribeč. La montoj Zoborské vrchy troviĝas en la plej suda parto de la montaro Tribeč. La plej valora kreskaĵo en la montoj thlaspi jankae (slovaka monerherbo), malgranda blankflora kreskaĵo trovebla nur en Zoborské vrchy kaj Slovenský kras. La zoboraj arbarstepoj estas plenaj je valoraj protektataj specioj kiel irido malalta, pulsatilo grandflora kaj adonido printempa.

Fine de somero vi vidos mantojn saltetantajn en herbejo; slovakoj nomas ilin modlivka (modliť sa = preĝi), pro la tipa pozicio kun la antaŭaj kruroj levitaj, tiel ke ili similas preĝanton. Vivas tie ankaŭ stepa bestaro kaj belegaj multkoloraj papilioj.

Nitra – tio estas ankaŭ novaj kvartaloj kaj domaroj, stratoj kaj vojoj, parkoj kaj parketoj, reliefoj kaj statuoj, ankaŭ novaj modernaj konstruaĵoj, prizorgataj publikaj spacoj, entreprenoj kaj fabrikoj.

sidejo de diocezo ekde

**880**



## LA 10 PLEJ BONAJ LOKOJ EN NITRA!

# KASTELA AREO

Vizitu la plej signifan lokon de Nitra kaj ĝuu unikan etoson, kiun ofertas al vi la kastela areo. La kastelo de Nitra, kune kun sia fortikaĵo, estas la plej granda mezepoka fortigita setlejo. Enrigardu en la  Bazilikon de Sankta Emeramo, la turon Vazulova veža, kazematojn, la gotikan ĉirkaŭfosaĵon, kaj lasu historion forte impresi vin. La kastelo Nitriansky hrad estas nacia kultura monumento konsistanta el pluraj memstaraj partoj.

**Fortikaĵo de la kastelo** aperis iom post iom dum la 16-a kaj 17-a jarcento. Ĝin konstruigis episkopo Pálfy en 1673 dum la regado de Leopoldo la 1-a (latina surskribo super la pordego) kiel defendilon kontraŭ turkoj. Ĝi estas stelforma fortikaĵsistemo kun 5 potencaj angulaj bastionoj. Sur ili estas bustoj de militestroj de la epoko de Leopoldo.

**La katedralo de sankta Emeramo** konsistas el la supra kaj malsupra preĝejoj kaj de romanika preĝejeto.

**La romanika preĝejeto de sankta Emeramo** estas la plej malnova parto de la katedralo. Ĝi estis konstruita en la 11-a jarcento en romanika stilo,



## urbo de sakralaj monumentoj kaj pilgrima loko

kastelo, katedralo, preĝejoj, monaĥejoj, kalvario

sed poste ĝi alprenis gotikajn trajtojn. Povas esti, ke ĝi staras sur la loko de la unua kristana preĝejo konstruita de Pribina. La nuna interno estas rezulto de rekonstruado okazinta inter 1931 kaj 1933. Troviĝas tie restaĵoj de sanktaj Andreo kaj Benedikto, kaj ankaŭ valora arĝenta relikvujo kun restaĵoj de sankta Cirilo.

**La supra preĝejo Horný kostol** estis finkonstruita inter 1333 kaj 1355 sur la plej alta loko de roka monto. La originan gotikan internon de la preĝejo rekonstruigis en baroka stilo episkopo Erdődy post 1711. La freskaj pentraĵoj sur la volbo estas verko de la aŭstra pentristo G. A. Galliarti. La ĉefa baroka altaro estas verko de la itala majstro Martinelli el la unua duono de la 18-a jarcento. Inter aliaj valoraj verkoj estas ankaŭ Renesanca baptejo el 1643. La supra preĝejo estas unu el la plej valoraj barokaj templaj internoj en Slovakio.

**La malsupra preĝejo Dolný kostol** estis alkonstruita al la supra preĝejo inter 1621 kaj 1642. Ĝia ĉefa trajto estis ĝis antaŭnelonge valora altaro „Depreno de la kruco“ el 1622, kies aŭtoro estas la aŭstra skulptisto J. Perneger. Ĉi tiu altaro estis movita de la origina loko al la kontraŭa muro post malkovro de valora fresko el la 14-a jarcento, kiu ilustras la vivon de Maria.



urbo de kulturo
**festivaloj, aranĝoj, koncertoj, 2 teatroj**

**Episkopa palaco** – ĝia fundamento devenas de Mezepoko. Ĝia hodiaŭa aspekto estas rezulto de konstruaj modifoj dum kelkaj jarcentoj. La lastaj barokaj ŝanĝoj estis faritaj en la 18-a jarcento. Brulego en 1924 detruis la tegmenton kaj parton de la episkopa arkivo. Hodiaŭ ĝi estas sidejo de la episkopa ofico.

**Administraj konstruaĵoj** troviĝas en la korto de la kastelo. La ronda turo estas restaĵo de mezepoka fortikaĵo kun novgotika superkonstruaĵo el la jaro 1857. En tiu konstruaĵo troviĝas hodiaŭ la muzeo Diecézne múzeum kun granda kvanto da objektoj, kiuj dokumentas la historian evoluon de la urbo kaj de la kastela monteto. La enira pordego estas Renesanca. La administra konstruaĵo super la pordego estis konstruita fine de la 16-a kaj komence de la 17-a jarcento. Antaŭe estis tie loĝejo de la ĉefserĝento de la kastela garnizono. En la korto estis ankaŭ loĝejoj de servistoj, stokejoj kaj ĉevalejoj. En la gotika ĉirkaŭfosaĵo troviĝas hodiaŭ malkovrita ekspozicio pri la grand-moravia remparo de la 9-a jarcento – en la kazemato de la fortikaĵo.

**La turo Vazilova veža** estas parto de la mezepoka fortikaĵo. Legendo diras, ke tie estis malliberigita kaj mortigita Vazil (Vazul), nevo de la reĝo Stefano la 1-a, kiu estis la legitima heredanto de la trono. Onidire en la subterejo de la turo estis malsatigejo.




Venu ĉi tien ankaŭ por malkovri la sekreton de la katedrala trezoro. La muzeo Diecézne múzeum allogas vizitantojn precipe per ekspozicio de valoraj liturgiaj objektoj, per la plej malnova konservita manskribaĵo en la teritorio de Slovakio el 1083, kopioj de la aktoj Zoborské listiny devenantaj el la jaroj 1111 kaj 1113.

## SUPRA URBO

Romantikaj stratetoj kaj misteraj kaŝanguloj, ĉarma etoso, grandiozaj preĝejaj konstruaĵoj, historiaj monumentoj kaj dormema etoso: ĉion ĉi ofertas la urba historia monumentrezervejo. Vizitante ĝin nepre ne pretervidu la statuon de Corgoň, juna forĝisto, kiu savis la kastelon de turkaj atakoj, la statuon de Pribina, la seminariejojn Malý seminár kaj Veľký seminár kaj multajn aliajn vidindaĵojn. En la seminariejo Veľký seminár, konstruita inter 1764 kaj 1770, havas sidejon dioceza librejo, kiu enhavas proksimume 66 000 grandvalorajn librojn. 78 el ili estas la unuaj eldonoj (inkunabloj) el la jaroj 1473 ĝis 1500. Ĉu vi sciis, ke post kiam vi karesas la piedojn de Corgoň, unu el viaj deziroj plenumiĝas?



Párovské lúky
Nitra
hydroelektráreň
Sihoť
LETNÉ KÚPALISKO
MESTSKÝ PARK
Mestský park
Penzión PKO Nitra
ŽUPNÝ DOM
Nábrežie za hydrocentrálou
Parkové nábrežie
Piesková
Vodná
ihr.
SPU
Tulipánová
Janka Kráľa
Nová
Přehradná
Kocelova
Schurmannova
Vikárska
Ďurková
Farská
Hotel Capital
Jozefa Vuruna
Správa katastra
Lidl
KOSTOL NA VŔŠKU
Bratislavská
Tesco
Obchodné centrum Galéria
Chevrolet
Mazda
Škoda
KR PZ
ZŠ
zubná poliklinika
Kostol sv. Štefana
Mariánska
gymnázium
Párovská
Piaristická
KLÁŠTORNÝ
Pri synagóge
Školská
Hotel Comfort
OÚ ŽP
Štúrova
azylový dom
MŠ
PIARISTICKÝ KOSTOL
Palánok
Cyrilo-Metodské nám.
Skalná
gym.
Stavbárska
Hviezdna
Nitrianska tepl. spol.
MESTSKÁ HALA
Svetlá
Holého
Branického
Fabrická
Kollárova
Bernolákova
Osvaldova
ZSŠ dopravy, obchodu a služieb
Kraj. a okr. súd
Kraj. a okr. prok.
Daňový úrad
Židovský cintorín
ŽIDOVSKÝ CINTORÍN
ŠZŠ
Mudroňova
Pri Červenom kríži
Vajanského
Mestská polícia
Štrková
Mikado
Krátka
ZŠ
SOŠ potrav.
Nám. kráľovnej pokoja
Cintorínska
Ústav na výkon väzby
Damborského
7. pešieho pluku
OC Mlyny
Kavcova
Kolumbárium
Mestský cintorín
STARÉ DIVADLO
Reg. úrad verej. zdravotníctva
UNIVERZITA KONŠTANTÍNA FILOZOFA
UKF
Párovský cintorín
Urbánkova
Sliečna
Švecova
Košická
Coboriho
MESTSKÝ ÚRAD
Obchodné centrum Polygon
Richtára Peregrina
Okresný úrad
Správa katastra
Hodžova
Hanulova
Železničiarska
Staničná
Družstevná
ÚPSVaR
Špitálska
Inovecká
Tajovského
Penzión Premona
Tur. ubytovňa Tofi
Štefánikova trieda
Polyfunkčný komplex Nova Nitra (vo výstavbe)
Fakultná nemocnica s poliklinikou
Jána Galbavého
Bottova
Červenova
Hattalova
Golianova
Domov dôchodcov
Južná
Čulenova
Úrad NSK
Rázusova
Pivovarská
Banská
8. mája
Jarmočná
Krčméryho
P. Benického
Čermánske nám.
Novozámocká
SPŠ stavebná
KOSTOL V KRŠKANOCH




© Mapa Slovakia Editor s.r.o., 2015




# PIEDIRA ZONO

Promenu en la Piedira zono, kiun ornamas artaĵoj en la spirito de la grand-moraviaj tradicioj: granda kopio de historia glavo el bronzo, fera fontano, fermotabuloj de la epoko de la Grandmoravia imperio, kvin metrojn alta muzika horloĝo, ĉeangula fontano kun trinkakvo kaj la vergoj de Svätopluk. Rigardu ankaŭ la unikan placon Svätoplukovo námestie, kiu estas centra kaj ripoza areo de Dolné mesto. Ĝuu kafon en la strato Kupecká, ĝurigardu la montrofenestrojn de la vendejetoj kun artaj objektoj aŭ stilaj antikvaĵoj.

# KALVARIO

Sur unu el la sep montetoj troviĝas la kalvario de Nitra kun dek du kapeletoj reprezentantaj la haltojn de la Kruca vojo. Elrigardejo kun lorno ofertas belegan vidon al la tuta urbo. Ne preterlasu la muzeon Misijné múzeum, en kiu troviĝas etnologiaj ekspoziciaĵoj, ekzotaj bestoj kaj birdoj el la tuta mondo. La kalvarian monton ĝuas ankaŭ montogrimpistoj.




# SINAGOGO

La sinagogo Nitrianska synagóga el la jaro 1908 estas unu el la plej malnovaj sinagogoj en Slovakio. Ĝi atestas la judan historion, ĉar la urbo dum jarcentoj estis inter la plej gravaj centroj de juda vivo en Slovakio. Ĝia unika maŭr-bizanca arkitekturo donas al ĝi allogan aspekton. Danke al perfekta akustiko la sinagogo estas uzata ankaŭ kiel koncertejo kaj oni organizas tie ekspoziciojn, diskutrondojn, festajn sociajn eventojn…

# URBA PARKO

Por familioj kun infanoj estas ideala elekto la parko Mestský park Sihoť, kiu estas unu el la plej belaj en Slovakio. En la plej malnova parto troveblas amaso da infangrimpiloj, balanciloj, ŝnura obstaklokuro kaj labirinto, karuseloj kaj trampolinoj, kampara korto kun hejmbestoj, historia rana fontano kun akvofeo Žblnk kaj bufedo kun refreŝigaĵoj. En la 20-hektara parko troviĝas ankaŭ somera naĝejo. La belegajn vojetojn ĉirkaŭ la lagoj aprezas patrinoj kun infanĉaretoj, biciklistoj kaj glitkuristoj. Fiŝkaptistoj plezure utiligas la lagojn, en unu el ili eblas eĉ boatumi somere.



# SLOVAKA AGROKULTURA MUZEO

La unusola muzeo dokumentanta historion de agrokulturo en Slovakio. En la subĉiela muzeo troviĝas objektoj el la tuta Slovakio: bakejo, muelejoj, distilejo, laktejo, abelejoj… Rekonstruaĵo de frumezepoka kampara setlejo, bieno, popola lernejo kun ekspozicio de lerniloj kaj historia vendejo kun gustumado de tradicia muelita kafo kaj kreivaj metiejoj: jen la ĉefaj programeroj de la subĉiela muzeo. Post la vizito veturu per mallarĝŝpura vaportrajno ĉirkaŭ la muzeo, aŭ al unu el la allogaj ekspozicioj en la areo Agrokomplex.



**urbo de sporto**
**21**
sportejoj administrataj de la urbo

# ZOBOR

Por la vizitantoj de la montaro Zoborské vrchy estis kreita 14,7 kilometrojn longa instrua pado kun 27 haltoj. Facila promeno komenciĝas per trarigardo de la restaĵoj de la plej malnova monaĥejo en Slovakio. La monaĥejo Zoborský kláštor ekestis en la jaroj 850-880 en la okcidenta deklivo de Zobor. Kun la monaĥejo estas ligitaj ankaŭ la plej malnovaj kaj plej valoraj skribaj dokumentoj pri nia teritorio: la aktoj Zoborské listiny el la jaroj 1111 kaj 1113.

La celo de piedirantaj turistoj estas ĉefe Pyramída (553 m), al kiu gvidas blua turisma vojo. Ne forgesu survoje halti en la groto Svoradova jaskyňa (355 m). La ermito Svorad alvenis al Nitra el Pollando dum regado de la hungara reĝo Stefano la 1-a kaj tie eniris la benediktan monaĥismon en la monaĥejo de sankta Hipolito en Zobor. Laŭlegende Svorad vivis ermite en groto proksima al la monaĥejo, kiu ekde tiam nomiĝas Svoradova jaskyňa. La unuhora grimpado rekompencas vin per belega vido al la tuta urbo. Tie atendas vin elrigardejo kun lorno, fajrejo kun eblo rosti manĝaĵon kaj turisma ripozejo; iom sube de ĝi trarigardu restaĵojn de grand-moravia setlejo.




# PREĜEJETO EN DRAŽOVCE

La romanika preĝejo de sankta Mikaelo Ĉefanĝelo, rekonstruita en la 11-a kaj 12-a jarcentoj, staras sur roka monteto en la urboparto Dražovce. Ĝi estas la plej fotoplaĉa loko en la tuta Nitra!
Ĝi aperis plurfoje en muzikvideoj de famaj bandoj, sed ankaŭ sur poŝtmarko kaj ĝi eĉ estis ilustrita sur la iama kvindek-koruna monpapero. Fine de junio tiu ĉarma loko kovriĝas per piknikkorboj kaj centoj da homoj vestitaj per tradiciaj kostumoj! Ĝuu romantikan piknikon kun la nomo „Matenmanĝo en herbejo“!



# TRAJNETO DE NITRA

De majo ĝis septembro veturadas ĉiuhore trajneto. La ekveturejo estas la komenco de la piedira zono, antaŭ la novrenesanca konstruaĵo el la fino de la 19-a jarcento, domo Mestský dom. Per trajneto vi veturos preter la plej belaj monumentoj de Horné mesto kaj Dolné mesto. La domo Mestský dom gastigas ankaŭ la muzeon Ponitrianske múzeum, kiu enhavas la plej grandajn historiajn trezorojn kaj arkeologiajn elfosaĵojn de nia teritorio. Ĉiuj informoj pri nia belega urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas troveblaj en la sama konstruaĵo: la turisma informejo de NISYS.

# TRADICIAJ EVENTOJ

| | |
|---|---|
| januaro | Urba homhelpa balo |
| februaro | Karnavalo de Nitra |
| marto – aprilo | Muzika printempo de Nitra |
| aprilo | Printempaj kutimoj |
| majo | Internacia orgena festivalo Ars organi |
| aprilo/majo | Universitataj tagoj de Nitra |
| majo/junio | Malfermo de la somera turisma sezono |
| majo | Nokto de muzeoj kaj galerioj<br>Nokto de preĝejoj<br>Zoboraj festoj de la sankta Urban |
| majo/junio | Festivalo Stretnutie, setkání, spotkanie, találkozás |
| junio/julio | Internacia festivalo de sakrala muziko Musica sacra |
| julio – aŭgusto | Kultura somero de Nitra |
| 4.7. – 6.7. | Nitra, kara Nitra... Ciril-metodaj festoj |
| 22.8. – 24.8. | Budoj de Chrenová + rikoltfesto |
| 29.8. – 31.8. | Foiro de Klokočina |
| 30.8. | Fenikso de Janíkovce |
| 7.9. | Sub-zobora vinberrikolto |
| 14.9. – 20.9. | Tagoj de la Eŭropa kultura heredaĵo |
| septembro/oktobro | Teatra Nitra |
| oktobro | Muzika aŭtuno de Nitra |
| novembro | Festivalo de ĥoroj Zbory mestu |
| decembro | Kristnaska Nitra |

Internaciaj ekspozicioj en la ekspoziciejo Agrokomplex www.agrokomplex.sk

# KONSILOJ POR LOĜADO EN NITRA

**Hotel Agroinštitút,** Akademická 4, 037/ 791 01 11 www.agroinstitut.sk
**Hotel Alexanders,** Mostná 68, 037/ 792 04 01 www.alexanders.sk
**Hotel Átrium,** Štefánikova 8, 037/ 652 37 90 www.hotelatriumnitra.sk
**Hotel Autojas,** Cabajská 29, 037/ 777 76 00 www.autojas.sk
**Hotel Capital,** Farská 16, 037/ 692 52 01 www.hotelcapital.sk
**Hotel Centrum,** Svätoplukovo nám.1, 037/ 655 43 97 www.hotelcentrum.sk
**Hotel City,** Svätoplukovo nám.1, 037/ 652 12 03 www.city-hotel.sk
**Hotel Comfort,** Školská 1, 037/652 52 30, 0918 445 661 www.hotelcomfort.sk
**Hotel De Luxe,** Podzámska 18B, 037/ 741 50 22, 0918 779 599 www.hoteldeluxe.sk
**Hotel Golden Hoffer,** Farská 41, 0911 511 110 www.golden-hoffer.sk
**Hotel Mikado,** Hollého 11, 037/ 321 03 21 www.hotelmikado.sk
**Hotel Nitra,** Novozámocká 214, 037/ 631 69 54 www.hotelnitra.sk
**Hotel Oko,** Fraňa Mojtu 6, 037/ 651 03 63 www.oko-centrum.sk
**Hotel River,** Nábrežie mládeže 2A, 0905 244 245 www.hotelriver.sk
**Hotel Zlatý kľúčik,** Svätourbanská 27, 037/ 655 02 89 www.zlatyklucik.sk
**Hotel Zobor,** Štefánikova 5, 037/ 652 53 81 www.hotelzobor.sk

**Penzión Artin,** Svätourbanská 37, 037/ 651 61 01 www.penzionartin.sk
**Penzión Hoffer,** Hlohovecká cesta, 0914 324 141 www.penzion-hoffer.sk
**PKO Nitra,** J. Kráľa 4, 037/ 741 30 46 www.pkonitra.sk
**Penzión u Krba,** Gorazdova 56, 0918 055 066 www.ukrba.sk
**Penzión Lux,** Gorazdova 58, 037/ 692 31 11 www.luxpenzion.sk
**Penzión Moretti,** Sládkovičova 15, 037/ 772 14 21 www.pensionemoretti.sk
**Penzión Pribina,** Radlinského 15, 037/ 631 31 61 www.penzionpribina.sk
**Penzión Premona,** Železničiarska 44, 037/ 653 31 85 www.premona.sk
**Penzión Pri mlyne,** Pri mlyne 42, 037/ 653 71 22 www.penzionprimlyne.sk
**Penzión Pohoda,** Chrenovská 13, 037/ 650 65 38, 0905 926 585
**Pezión Quartet,** Štúrova 57, 0918 379 121 www.penzionquartet.sk
**Penzión Tofi,** Martinská dol. 66, 037/ 651 67 03 www.penziontofi.sk
**Penzión Vila Ária,** Dobšinského 31, 037/ 651 77 39 www.aria.sk
**Penzión Zoborská,** Dolnozoborská 8, 037/ 651 11 94 www.penzionzoborska.sk

**Ubytovňa NITRA,** Čajkovského 2, Nitra, 037/6518700, www.ubytovnanitra.sk
**Ubytovňa NITRAN,** Sládkovičova 7, Nitra, 037/6534286, www.ubytovanienitran.sk
**Ubytovňa pri Lipe, Rastislavova 25, Lužianky, 037/ 233 37 68**
**Ubytovňa Tofi,** Železničiarska 44, Nitra, 037/7411503, www.ubytovnatofi.sk

**Malfermhoroj de NISYS, kontakto**
Nitriansky informačný systém – NISYS
Mestské a turistické informačné centrum
Štefánikova trieda 1, 949 01 Nitra
Tel.: +421-37-7410 906
Retpoŝto: info@nitra.sk
www.nisys.sk, www.nitra.sk

**101-a Universala Kongreso de**
**ESPERANTO**
**23.-30.07.2016 Nitra, Slovakio**

## NITRA

Eldonis: Urbo Nitra en 2015
Prilaboris: T. Galová, P. Vörosövá
Traduko: Matthieu Desplantes
Provlego: Katarína Novotníčková
Grafika ellaboro: Peter Jánsky
Foto: M. Havran, H. Mišovič, P. Rafaj, V. Florková, J. Košťál
Presado: Michelangelo, Nitra

*Eldonita okaze de la 101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra 2016.*